

Hans Dubois, Bellinzona

2-a eldono 2020
Funde tralaborita

Heinz Kahlau

Kaj ni solas

Poemaro

Tradukis István Ertl

Heinz Kahlau
“Kaj ni solas”

Eldonejo Hans Dubois
Carlevaro
Viale G. Motta 32
CH-6500 Bellinzona
tcarlevaro@bluewin.ch

Senpage elŝutebla el www.taziocarlevaro.ch

1-a eldono 1991

Hans Dubois, en Bellinzona, kaj en Budapeŝto, en la serio *Modernaj Poetoj en Traduko*

2-a eldono 2020

Hans Dubois, en Bellinzona, Svislando.

Nekomerca publikigo kaj disvastigo. Non-commercial publication and distribution

Libro kun poemoj selektitaj kaj tradukitaj de István Ertl (Hungario/Luksemburgio).

Okaze de tiu ĉi dua eldono, la tradukinto reviziis kaj modifis plibonige la tradukitajn tekstojn.

ISBN: 978-88-87282-44-3

Dankon pro ilia helpo al

*Gerd Bussing
Tazio Carlevaro
Probal Dasgupta
Birgit Höckel
Mario Lépine
Katrin Mattusch*

Antaŭvortoj

Ŝajnas al mi, ke Heinz Kahlau ne estas granda poeto. Eble “minora” lin nomus literaturhistorio. Kaj ĝuste per tio li ĉarmas: li ne kaŝas sin post arbaro da simboloj kaj lingvaj eksperimentoj; li ne hontas verki poemon kun titolo kiel “Konsolo” aŭ eĉ “Mi amas vin”. Tradukanton li devigas al akrobataĵoj ne mortdanĝeraj.

Sed jen la ezoka hoko: mi fakte pekis kontraŭ la regulo Varengjena, Dediega kaj de ĉiuj sobruoj. Mi cedis al la tento esperantigi el lingvo nepropa. Tial ĉiu misinterpreto kaj fuŝo refalu sur mian kapon; eventualaj beloj dankeblas parte al konsildonintoj. Mi krome konfesu, ke pri Heinz Kahlau mi scias nur pli-malpli: li estas poeto germana (GDR) naskita en 1931, kies du poemoj ornamas la murojn de metrostacio Alexanderplatz en Berlino. Tie konatiĝis tradukonto kun tradukoto, dum la tempo de metroatendo. La sorĉo de tiu nerezistebla momento estu la senkulpigo de la ĉi-sekva elekto, bazita plejparte sur la volumoj “Lob des Sisyphus”, Leipzig, 1980, kaj “Querholz”, Berlin-Weimar, 1989.

Tiu ĉi poemareto estas la unua ero en la esperanta serio “Modernaj Poetoj en Traduko”.

István Ertl

Bellinzona, la 21-an de junio, 1990

Mallonga biografio pri Heinz Kahlau

Tazio Carlevaro



Heinz Kahlau naskiĝis 6.2.1931 en Drewitz, proksime de Potsdam, kies parto ĝi fariĝis en 1939. Li mortis 6.4.2012 en Greifswald en Germanio.

Li ne lernis profesion. Komence, li laboris kiel sendiploma laboristo. Li migris al Berlino, kie li studis 1953-1956 ĉe la *Akademie der Künste* (*Arto-Akademio*). Unu el liaj instruistoj estis Bertolt Brecht.

Li eklaboris memstare en la literatura kampo en 1956, verkante lirikajn poemojn, prozaĵojn, teatraĵojn kaj kantojn. Krome, li kreis ankaŭ filmscenariojn.

Kaŭze de kritikaj versoj, verkitaj okaze de la hungara ribelo (1956), li klopodis eviti punon, varbiĝante kiel neoficiala informanto de la GDR¹-a Sekureca Ministerio, inter 1956 kaj 1964, kiel li memvole agnoskis en 1990. El tiu kunlaboro, kaj el parti-aparteno, fontis ankaŭ pli facila aperigo de libroj, kaj la ricevo de atento, premioj kaj ŝtataj honorigoj. Li estis socialisto, ligita al la GDR-a reganta komunista *Socialista Unuecpartio* (SED²). Sian kapablon esprimi sin poezie li utiligis ankaŭ, laŭ helena kompreno de panegiro, por prikanti la intergermanan muron, la traktoristojn, la ŝtatan junularan organizaĵon (FDJ³). Temas pri aspektoj de la tiama real-socialisma sistemo, en kiu li vivis. Sed ja, li kredis je socialismo, kiun li esperis reformebla. Ankaŭ post la fino de GDR, li restis fidela al socialismo. Post la unuiĝo de la du germanaj ŝtatoj, li aniĝis al la partio *Die Linke*⁴, deveninta el la tiama socialista partio de GDR.

Li estis esence lirikisto, kaj, ĝuste kiel tia, li atingis sian plej altan famon. Liaj poemoj transformas ĉiutagajn momentojn, kie rolas intimeco, subjektiveco, emocio, situacio individua, al unika lingve virtuoza poezia rakonto. Tiusence, ja “minora” poeto. Sed “minora” certe ne en lia lirika produkto, kie troviĝas pluraj ĝuindaj gemoj, kiujn bone rekreis en esperanton la kompetenta laboro de la tradukinto István Ertl.

Biografio redaktita laŭ indikoj de István Ertl, kaj dank al la konsulto de la jenaj retpaĝoj:
https://de.wikipedia.org/wiki/Heinz_Kahlau, kaj https://wiki2.org/en/Heinz_Kahlau.

¹ GDR: Germana Demokratia Respubliko; Deutsche Demokratische Republik (DDR)

² Sozialistische Einheitspartei Deutschlands

³ Freie Deutsche Jugend (FDJ)

⁴ “La Maldekstro”

Das Paar

Sie lagen Bein an Bein,
wie sie gestorben waren,
bis man sie fand.

Sie lagen so
seit sechzigtausend Jahren.

Man löste seine Hand aus ihrer Hand.

La paro

Kruron al kruro, plu
kiel morto-hore,
kuŝis la paro.

Ĝis eltombigo
post sesdek mil jaroj.

Kaj malligiĝis ilia manligo.

Ich liebe dich

Ich liebe dich
heisst auch:
Komm,
schlaf mit mir.

Es kann auch heissen:
Lass uns Kinder haben.
Ich liebe dich.
Ich bin
sehr gern bei dir.
Lass uns zusammen sein
bis zum Begraben.

Ich liebe dich
heisst auch:
Sei zu mir gut,
mach mir das Leben leicht,
dass ich nicht zwingen.
Wenn ich allein wär,
fehlte mir der Mut.
Ich liebe dich,
mach, dass es mir gelinge.

Ich liebe dich
heisst auch:
Es macht mich stolz,
dass du mich mehr
als andere begehrt.
Und dass du mir, nur mir
und keinem sonst,
in allem, was du bist,
allein hörst.

Mi amas vin

Mi amas vin
signifas:
Dormu kun mi.

Sed ankaŭ: lasu,
ke ni idojn havu.
Mi amas vin,
min al vi
emas turni.
Ĉi tiun kunon ĝis
la tomb' ni savu.

Mi amas vin
signifas:
Faru plaĉe
mian klopodan vivon
sinforgesa.
Se solus mi,
ne agus mi kuraĝe.
Mi amas vin,
vi igu min sukcesa.

Mi amas vin
signifas:
Mi fieras,
ke min pli ol
aliajn vi sopiras.
Ke vi al mi, nur al mi
vin oferas,
kaj via ĉio
al mi sola iras.

Ich liebe dich
kann heissen:
Sei doch so,
wie ich den andren,
den ich suche, sehe.
Erfüll mir meine Träume,
mach mich froh,
dass ich bestätigt
durch mein Leben gehe.

Ich liebe dich
heisst auch:
Ich will so sein,
wie du mich brauchst –
ich will dein Schatten werden.
So nützlich
ist dir keiner, ich allein
kann alles für dich tun
auf dieser Erde.

Ich liebe dich
heisst immer:
Ich will dich
für etwas haben,
das mir Glück verspricht.
Manchmal entsteht daraus:
Wir lieben uns.
Erst dieser Satz
hat wirkliches Gewicht.

Mi amas vin
signifas:
Estu tia,
kia mi emas
vidi la alian.
Plenumu miajn songojn,
kaj kun via
konfirmo mi trairu
vivon mian.

Mi amas vin
signifas:
Mi min volas
kia vi min bezonas –
via ombro.
Por fari
ĉion ajn por vi mi sola
utilas sur ĉi ter’
el granda nombro.

Mi amas vin
signifas tamen ĉiam:
Mi havu vin
kiel feliĉ-promeson.
Kelkfoje diras ni:
Ni amas nin.
Nur tiu frazo
havas veran pezon.

An einem Tag

Ja geh nur, geh. Der Anfang hat kein Ende.
Bleib oder komme wie der erste Schnee.
Sieh in den Spiegel, sieh auf deine Hände,
und tu auch dir mit deinen Blicken weh.

Wart keine Antwort ab, sie ist für dich nicht richtig.
Verpack die Träume, ihre Zeit ist um.
Jetzt sind nicht Tränen und nicht Lächeln wichtig.
Ja geh nur, geh. Was jetzt noch zählt, ist stumm.

Iun tagon

Jes, iru. La komenco ne finiĝas.
Restu aŭ venu kiel frua neĝo.
Rigardo alspiegula nun sufiĉas,
Ankaŭ vin dolorigu ĝia eĝo.

Respondon ne atendu, ja por vi ĝi ne pravas.
La revojn paku, ili ne plu sencas.
Nun jam nek larmoj nek ridetoj gravas.
Jes, iru. Mutas, kio plu esencas.

Erfahrung

Leb wohl,
mein Kopf ist wirr,
mein Leib ist ausgebrannt.
Nun weiss ich Schmerzen,
die ich bisher nicht gekannt.
Geh los,
lass mich allein,
wir kommen nicht mehr an.
Doch habe Dank.
Ich weiss nun wieder,
dass ich lieben kann.

Sperto

Adiaŭ,
vertiĝas mia kap',
elbrulis mia korp'.
Nun konas mi dolorojn
ŝparitajn de la sort'.
Foriru,
lasu min,
ja kuni ne plu eblas.
Kaj tamen dankon.
Mi scias nun denove,
ke ami mi kapablas.

Bitterer Vorschlag

Von nun an bitte ich:
mich zu vergessen.
Ich bin nicht nötiger
als Salz und Wind.
Stört dich das Salz,
so zuckere dein Essen.
Stört dich der Wind –
bleib nicht, wo Winde sind.

Amara propono

Mi petas vin forgesi
min, komprenu.
Mi ne necesas pli
ol salo, vento.
Ĝenas la sal' –
tiam sukeron prenu.
Ĝenas la vento –
serĉu ventsilenton.

Das Gesetz der Liebe

Wer sich selbst
mehr liebt
als jeden anderen,
aber geliebt werden will,
kann nur eine würdelose Liebe
erlangen.
Solche Liebe aber
ist Sklavenliebe.

Niemals
haben Herren
und Sklaven
miteinander
Menschlichkeit
produziert.
Nur Ebenbürtige
produzieren.
miteinander,
auch in der Liebe,
die Würde.

La leĝo de amo

Kiu sin mem
pli amas
ol ĉiujn aliajn,
sed volas esti amata,
tiu povas
akiri
nur amon sendignan.
Tia amo tamen
estas sklav-amo.

Neniam
produktis
sinjoroj
kaj sklavoj
kune
humanecon.
Nur egalranguloj
kune
produktas,
ankaŭ en amo,
la dignon.

Du gehst

Es war so,
daß ich dich suchen mußte.
Es war so,
daß ich dich finden mußte.

Daß ich dich kennen,
daß ich dich lieben mußte –
es war so.
Daß ich dich halten mußte –
so war es nicht.

Vi foriras

Estis tiel,
ke mi vin serĉadu.
Estis tiel,
ke mi vin eltrovu.

Ke mi ekkonu,
ke mi amu vin –
estis tiel.
Ke mi gardu vin –
tiel ne estis.

Plano por adiaŭo

Plan für einen Abschied⁵

Mi pretigos min al tio,
kvankam ja povos longe daŭri,
ke vi venos por diri:
nun estas tiel.
Mi iros malrapide.
Tiel ne necesos
senmove stari.
Per la plej pezaj
timoj mi min ŝargos
dekomence, por ke
la fino estu por mi
pli facila.
Multon
mi jam estos demetinta,
dum la blankaj pintoj
de l' solecoj
ankoraŭ foros.

Mi pretigos min al tio,
ke mia plej danĝera kontraŭulo
mi estas mem.
Nur tiel
mi povos esti certa,
ke mi ne embuskas
min dedorse.
Tiel
mi venkos min
antaŭ senkuraĝiĝo.
Sed mi pretigos min al tio,
ke povos ja longe daŭri.

⁵ Ne eblis trovi la originalan tekston en la germana lingvo.

Adiaŭo

*Abschied*⁶

Dum ŝi antaŭsciis, ke li venos,
ŝi decidis fini la aferon.

Dum li staris jam en ŝia ĉambro,
ŝi ja volis diri: nun reiru.
Sed ĉar io brilis en liaj okuloj,
ŝi rekisis lin.

Dum li iris for sekvintmatene,
la lasta vort' jam estis eldirita.
Tamen iom ŝi malĝojis,
dum ŝi kuŝis sola en la lito.

⁶ Ne eblis trovi la originalan tekston en la germana lingvo.

Bei einem Abschied

Laß uns nicht auseinandergehn
wie Leute,
die ein schlechtes Geschäft
gemacht haben.
So nah
sind wir uns nur gekommen,
weil wir uns sonst
nicht erkennen konnten.
Wenn du von Betrug reden willst,
rede von Selbstbetrug.
Wenn wir etwas verloren haben,
sind es Illusionen.
Was wir gewonnen haben,
sind Erfahrungen.
Enttäuscht sind wir nur
von uns selber.
Daß wir uns trennen,
liegt daran,
daß wir ehrlich waren.
Laß uns nicht auseinandergehn,
als ob wir
ein schlechtes Geschäft gemacht hätten.

Adiaŭe

Ni ne disiru tiel,
kiel homoj,
kiuj faris iun
misnegocon.
Tiom
proksimaj ni iĝis nur
ĉar alie ne
eblis nin ekkoni.
Se vi volas paroli pri trompo,
parolu pri memtrompo.
Se ni ion perdis –
iluziojn.
Kion ni profitis –
estas spertoj.
Elreviĝon ni sentas
pri ni mem.
Nian disiĝon
kaŭzas
honesteco.
Ni ne disiru tiel,
kvazaŭ ni farintus
ian misnegocon.

Wir haben gesungen

Du fragst mich,
wo ich gewesen bin,
daß ich nicht heimfinde,
schon lange zu Haus.
Mit den Männern bin ich gegangen
mit den Äxten.
In den Wäldern, zwischen den Bergen
bin ich gewesen.
Wir haben geschuftet, geschwitzt,
gegessen, getrunken –
wir haben gesungen –
gesungen den ganzen Tag.
Auch ich habe gesungen, ich;
der ich nicht singen kann,
hab mit den Männern gesungen.
Nun fragst du mich,
wo ich gewesen bin,
daß ich nicht heimfinde,
schon lange zu Haus.

Kaj ni kantis

Vi demandas,
kie mi estis,
ke – jam delonge hejme –
mi min ne retrovas.
Mi foriris kun la viroj,
kun hakiloj.
En la arbaroj, inter la montoj
mi estis.
Ni laboregis kaj ŝvitis,
manĝis kaj trinkis –
kaj ni kantis –
kantis la tutan tagon.
Ankaŭ mi kantis, mi,
kiu ne scias kanti,
kantis kun la viroj.
Nun vi demandas,
kie mi estis,
ke – jam delonge hejme –
mi min ne retrovas.

Entfernungen

Das Mittelstreckenflugzeug
brauchte zwei Stunden
bis Belgrad.
Ich habe fünfzehn Jahre gebraucht.
Mein Telefon verbindet mich
in zehn Sekunden mit meinem Kollegen
aber seit fünf Jahren
haben wir nichts mehr
zu sprechen gehabt.
Die Entfernungen sind kürzer
und schmerzlicher geworden.

Distancoj

La mezdistanca flugo
bezonis du horojn
ĝis Beogrado.
Mi bezonis dekkvin jarojn.
Mia telefono kontaktigas min
en dek sekundoj
kun mia kolego –
sed de kvin jaroj jam
ni havas nenion
por diri al ni.
La distancoj fariĝis
pli kurtaj kaj pli doloraj.

Gastarbeiter

Endlich bin ich hierzuland ein Fremder,
ledig jeder Pflicht, mich einzumischen.
Zeig ich das gewünschte Wohlverhalten,
lobe, was man will, und schweige heiter,
darf ich sicherlich im Lande bleiben.

Wenn ich die Touristenregeln achte,
meinen Dolmetsch fröhlich anerkenne,
niemanden mit Meinungen erzürne,
keinem Landesbrauche lästig werde,
werde ich bestimmt nicht abgeschoben.

Ich kenn keine ungelösten Fragen.
Ich kann wegsehn, brauch nicht hinzuhören,
niemand fragt nach meinen Fähigkeiten.
Sicher sind das sonderbare Sitten –
mich geht das nichts an – ich bin ein Fremder.

Gastlaboristo

Fine, en ĉi land' fremdul' mi estas,
sen la dev' enmiksi min en ion.
Mi kondukas kiel atendate,
laŭdas laŭ dezir', serene mutas,
rajtos nepre resti en la lando.

Se mi sekvas la turist-regulojn,
aprobante mian tradukiston,
per prijuĝo propra ne incitas,
kun la loka mor' ne karambolas,
certe mi ne estos elpelita.

Mi ignoras zorgojn ne traktitajn,
povas ne rigardi, ne aŭskulti,
kiu min demandus pri kapabloj?
Certe, regas kuriozaj moroj –
ne koncernas min – fremdul' mi estas.

Der Gast

Wie angenehm,
als Gast geliebt zu sein.
Die Freundlichkeit und die Geduld
der Gastherrn zu genießen,
bis du erkennst:
Weil du noch schuldlos bist,
an allem,
was in diesem Land geschah,
ist es so leicht,
dir seine Seele aufzuschließen.

La gasto

Kiel agrable,
esti amata gasto.
Ĝui amikecon, paciencon
de via gastiganto,
ĝis la rekono:
Ĉar vi ankoraŭ senkulpas
pri ĉio
okazinta en ĉi lando,
tiom facile li
antaŭ vi sin malfermas.

Reisen bildet

Der
fuhr nach Polen,
um einzukaufen.
Das Beste,
was er heimbrachte,
war die Erfahrung:
Man kann weniger haben
und trotzdem besser leben.
Das war seiner Frau
zu wenig.

Vojaĝo edukas

Li
vojaĝis Pollandon
por aĉetumi.
La plej bona,
kion li hejmen kunportis,
estis la sperto:
oni povas havi pli malmulte
kaj tamen pli bone vivi.
Tio por lia edzino
tro malmultis.

Sein oder Haben

Kein Rad kann sich drehn
um verschiedene Naben.
Es dreht sich ums Sein
oder dreht sich ums Haben.

Esti aŭ havi

Turniĝi ne povas
du-naba rado.
Ĝi turnas sin ĉirkaŭ
estad' – aŭ havado.

Der Rat

Was mir ein Zigeuner gesagt hat,
das sage ich keinem.
Er hatte mich angesehen,
eine Stunde lang.
Hatte sein Brot geschnitten,
mit einem schmalen Messer,
hat eine Zwiebel
und eine Gurke geschnitten
mit seinem schmalen Messer
und mich angesehen.
Eine Stunde
war zwischen uns
Schweigen und Messer,
dann sagte er es.
Es war traurig.
Es war weise.
Es war töricht.
Wir haben beide gelacht.
Was mir da der Zigeuner gesagt hat.
Ich sage es keinem.

La konsilo

Kion cigano diris al mi,
mi diros al neni.
Li rigardis min
dum tuta horo.
Distranĉis sian panon
per mallarĝa tranĉilo,
ankaŭ da cepo
kaj da kukumo li tranĉis
per sia mallarĝa tranĉilo
kaj rigardis min.
Tutan horon
estis inter ni
silento kaj tranĉilo,
poste li eldiris tion.
Estis malgaje.
Estis saĝe.
Estis sensece.
Ni ridis ambaŭ.
Kion tiam la cigano diris al mi.
Al neni mi diros.

Begegnung mit einem Europäer

In meinem Zimmer sitzt ein alter Mann.
Er lehnt den Kopf in einen schönen Sessel
und lächelt, wenn er spricht, ein wenig.
Ich sitze vor ihm und ich hör ihn reden.
Ich sehe seine alten schlauen Augen,
ich sehe seine schmalen welken Lippen.
Und als er sagt, ich soll ihm ruhig glauben,
weiß ich, daß ich in seinen stillen Plänen zähle.
Ich sehe seine greisen Männerhände,
seh seinen Blick und weiß, der kann nicht lieben.
Der redet da von Güte und von Liebe
und hat die Liebe schon solang vergessen.
Ich habe mit dem schlauen Greis zu rechnen.
Ich schalte ab und sehe ihn verschwinden.
So schwer ist heute schon das Haus zu hüten.

Renkontiĝo kun eŭropano

En mia ĉambro sidas maljunulo.
La kapon li apogas al fotelo
kaj dum parol' ridetas iomete.
Mi sidas antaŭ li kaj lin aŭskultas.
Mi vidas lian okulparon ruzan,
mi vidas liajn mince velkajn lipojn.
Kiam li diras: lin mi povas fidi,
mi scias, ke mi rolas en liaj kaŝaj planoj.
Mi vidas liajn manojn veteranajn,
lian rigardon: li ne povas ami.
Pri bono kaj pri amo li parolas,
kaj antaŭlonge amon li forgesis.
Necesas kun la maljunul' kalkuli.
Elŝalto, kaj mi vidas lin nuliĝi.
Ne simplas nun protekti sian hejmon.

Balado

*Moritat*⁷

Kiun ĝenas,
ke por pensadi
mi uzas
ne ties,
sed mian kapon,
tiu devus provi –
eble dum unu tago –
pensadi
per mia kapo.

Unu aferon tamen
ankaŭ tiam de li
mi ne transprenos:
la respondecon.

⁷ Ne eblis trovi la originalan tekston en la germana lingvo.

La plej bela

*Das Schönste*⁸

La vivo estas tamen ja plej bela.
Kun ĉiuj siaj prenu-ĝin-diablo
kaj kiom-tedas-min kaj ho-mirinde
kaj la-feliĉo kaj ĉiam-alia.
Kun manĝo kaj dormo kaj amo kaj
ree manĝo kaj drinko kaj laboro,
sukceso kaj ankaŭ malsukceso
kaj ĝenerale.
Mi diras: plej grandas kaj plej belas la vivo.
Kaj se ĝi estus trioble malfacila
kaj krome trioble pli longa –
mi ŝatus ĝin vivi.

⁸ Ne eblis trovi la originalan tekston en la germana lingvo.

Bitte um Nachsicht

Ich kann nur ganz einfache Sachen sagen.
Die jeder von selber erfährt,
die sowieso schnell vergessen werden,
an die man sich erst kurz vor dem Sterben wieder erinnert.
Nur so einfache Sachen kann ich sagen –
zu mehr reicht meine Geduld nicht.

Peto pri indulgo

Mi povas diri nur aferojn simplajn.
Kiujn de si mem ĉiuj spertas,
kiuj ĉiel rapide forgesiĝas,
pri kiuj oni nur antaŭ ol morti rememoras.
Tiajn aferojn simplajn mi povas diri –
por io pli mankas la pacienco.

Wann Männer am gefährlichsten sind

Erst,
wenn der Ehrgeiz
jede Sinnlichkeit ersetzt.
Wenn keine Frau mehr schafft,
sie abzulenken.
Wenn sie auch nachts
nur an Gesetze denken
und wenn sie nur noch
der Erfolg ergötzt.
Wenn sie nicht essen,
sondern nur noch kosten,
weil ihr nervöser Magen
böse wird.

Wenn ihnen langsam
die Gelenke rosten
und wenn sie keine Frage
mehr verwirrt.

Kiam viroj estas plej danĝeraj

Se jam
anstataŭ ĝu'
ili elektas
la gloron, se neniu in'
sukcesas
ilin deturni, se ili ne ĉesas
eĉ nokte plani,
se ilin delektas
nur karier',
kaj manĝo ne plu gustas,
ĉar ventro nerva sube
misdigestas.

Se la artikoj
lante jam ekrustas
kaj se nenia dub'
en ili restas.

Monster

Ich hab es nicht geschafft,
mich hart zu machen,
um diese Zeit und Welt
als Mensch zu überstehn.

So bin ich Monster,
das ein Mensch sein möchte.
Nur manchmal ist in mir
der Mensch zu sehn.

Monstro

Mi ne sukcesis
min sufiĉe hardi
por ĉi epokon nian
home vivi.

Do mi plu monstras,
dezirante homi.
Nur foje eblas
en mi homon vidi.

Der Tod des Dichters

Jetzt ist er tot.
Jetzt stellen wir die Fragen,
jetzt haben wir für seine Antwort Zeit.
Jetzt wissen wir, er wollte es uns sagen.
Jetzt, wenn er rief, wären wir bereit.

La morto de l' poeto

Nun mortis li.
Nun povas ni demandi,
nun tempas ni por aŭdi la respondon.
Nun scias ni: li ĝin dirontis al ni.
Nun, se li vokus, pretus jam la mondo.

Irrtum eines Dichters

Er wollte keine Welt mit Worten bessern.
Er wollte schlichten zwischen hin und her.
Er trug die Speisen nicht zu satten Essern,
er trug die Tropfen nicht ins volle Meer.

Die Leute sagten: Dieser hat Gesichte.
Er sah durch Zweifel ihre grosse Not.
Er bannte seine Furcht in die Gedichte,
In seiner Ohnmacht liebte er den Tod.

Eraro de poeto

Ne celis li per vortoj mondon savi.
Pacigon celis li tien-reenan.
Ne por manĝintoj sataj pladojn havi,
ne gutojn porti en la maron plenan.

Li estas viziulo, homoj diris.
Li dubo vidis ilian missorton.
Poemen sian timon li ekzilis.
Pro ĉi senpovo amis li la morton.

Literaturbetrieb

Sie schreiben Bücher über die Frage,
warum sie Bücher schreiben,
und lassen beim Schreiben der Bücher
über die Bücher
das Schreiben von Büchern bleiben.

Literatura industrio

Ili verkas librojn pri la demando,
kial ili librojn verkas,
kaj dum ili verkadas librojn
prilibrajn,
verkado de libroj velkas.

Leben

Selbst unter dem unbestechlichen Auge
des Forschers
hat das kristallklare Wasser
kristallene Klarheit.
Unter dem unbestechlichen Auge
der Mikroskope
ist davon nichts mehr,
sondern es zeigt sich
ganz voller Leben und
trübt sich.

Vivi

Eĉ por la nekorupteblaj okuloj
de esploristo
la kristalklara akvo havas
kristalan klarecon.
Por la nekorupteblaj okuloj
de mikroskopo
nenio restas el tio,
ĝi montriĝas, male,
tute vivplena kaj
opakas.

Narren und Seher

Immer wieder sichtbar schreiben sie
ihre Fragen in die Zeit.
Immer wieder aber treiben sie
ihre Träume viel zu weit.

Ihre Freundschaft ist nicht angenehm.
Ihre Zweifel bleiben lange frisch.
Immer wieder sind sie unbequem,
denn sie sehn im Fluss nicht nur den Fisch.

Frenezuloj kaj viziuloj

Re kaj re, demandojn ili skribas
en la tempon klarlitere.
Tamen, re kaj re, obeas ili
siajn sonĝojn tro libere.

Amikec' ilia malkonvenas,
kaj iliaj duboj longe vivas.
Ili ĉe river' re kaj re ĝenas,
ĉar ne nur la fiŝon ili vidas.

Und allein

Zwischen Tiere sind wir jetzt schon Fremde.
Zwischen Gräsern, zwischen Bäumen auch.
Fremd ist uns der Erdgeruch der Moose.
Uns verwirrt der Wind. Des Regens Hauch.

Unsre Liebe ist zu Haus in Städten.
Ihre Landschaft lasst uns sorglos sein.
Zwischen ihren Lärmen und Gerüchen
fühlen wir uns sicher. Und allein.

Kaj ni solas

Inter bestoj ni jam estas fremdaj.
Same inter herboj, inter arboj.
Fremdas por ni muska terodoro.
Nin konfuzas vent' kaj pluvogarboj.

En la urbo hejmas nia amo.
Ĝia pejzaĝaro nin konsolas.
Inter ĝiaj bruoj kaj odoroj
sentas ni sekuron. Kaj ni solas.

Morgenfurcht

Auch eine Großstadt kann so leer wie eine Kirche sein.
Wenn sich der Morgen vor den Fenstern krümmt
und nur die Vögel in den Höfen schrein,
dann frage ich mich oft, ob es noch stimmt
mit meiner jämmerlichen Menschlichkeit.
Dann bin ich manches Mal so weit,
dass ich mich wieder fürchten könnte, wie ein Kind,
das in den Nächten nach der Mutter schreit,
weil alle Dinge ringsum fremd und voller Grauen sind.
Denn hinter jeder kalten, harten Wand,
die mich vom Himmel und der Erde trennt,
da lebt ein fremder, unbekannter Mensch,
der auch nicht eine meiner Nöte kennt
und der sich kaum wohl auf die Seite dreht,
wenn neben ihm mein Leben stumm vergeht.

Matena timo

Ankaŭ grandurbo povas vaki kiel kirko.
Se alfenestre sin mateno tordas,
kaj en la kortoj krias nur la birdoj,
mi ofte min demandas, ĉu enordas
ankoraŭ mia humanec' mizera.
Jes, foje mi jam fartas, kiel vera
infano, rekaptata de angoro,
kiu por patrin' krias, timkolera,
ĉar ĉiuj aĵoj estas fremdaj, plenaj je hororo.
Ja post ĉiu malvarma, dura muro,
kiu min de ĉiel' kaj ter' prizonas,
fremdulo vivas, homo nekonata,
kiu ne scias, kion mi bezonas,
kaj kiu sin apenaŭ flankentenas,
dum mia muta viv' sin pretertrenas.

Das Lied von der Eile

Ein Fleisch wächst auf den Weiden.
Die Schlächter stehen bereit,
das Fleisch mit Macht zu zerschneiden –
es hat zum Wachsen nicht Zeit.

Wenn sie nur nicht solche Eile hätten,
wäre es besser für sie.
Was sie ohne diese Eile hätten,
kriegten sie nie.

Ein Weib geht durch den Hafen.
Die Männer stehen bereit,
das Weib mit Macht zu beschlafen,
es hat zum Lieben nicht Zeit.

Wenn sie nur nicht solche Eile hätten,
wäre es besser für sie.
Was sie ohne diese Eile hätten,
kriegten sie nie.

Ein Weiser wurde gefunden.
Die Leute stehen bereit,
mit Macht ihm Ruhm zu bekunden,
er hat zur Weisheit nicht Zeit.

Wenn sie nur nicht solche Eile hätten,
wäre es besser für sie.
Was sie ohne diese Eile hätten,
kriegten sie nie. Kriegen sie nie. –

La kanto pri la hasto

Sur kamp' iu karno elkreskas.
Buĉistoj pretigas atencon,
la karnon perforte dissekcias –
por kresko ne havas ĝi tempon.

Se ne tiom hastus foje ili,
pli bonus por ili tiam.
Kio eblus sen la hasto, ili
havos neniam.

Havene virino promenas.
La viroj pretigas atencon,
en liton perforte ŝin trenas,
por amo ne havas ŝi tempon.

Se ne tiom hastus foje ili,
pli bonus por ili tiam.
Kio eblus sen la hasto, ili
havos neniam.

Saĝulon oni eltrovas.
La homoj pretigas atencon,
per fort' al famego lin ŝovas,
por saĝo ne havas li tempon.

Se ne tiom hastus foje ili,
pli bonus por ili tiam.
Kio eblus sen la hasto, ili
havos neniam. Havos neniam. –

Stapellauf

Im neuen Schiff
mit alter Mannschaft
über das alte Meer
zu neuem Ziel.

Im alten Schiff
mit neuer Mannschaft
über das neue Meer
zu altem Ziel.

Im neuen Schiff
mit neuer Mannschaft
über das neue Meer
zu neuem Ziel.

Im alten Schiff
mit neuer Mannschaft
über das alte Meer
zu neuem Ziel.

1986

Lanço de ŝipo

En nova ŝip'
anar' malnova
sur la malnova mar'
al nova cel'.

Malnova ŝip'
anaro nova
sur la mar' nova al
malnova cel'.

En nova ŝip'
anaro nova
sur la mar' nova al
la nova cel'.

Malnova ŝip'
anaro nova
sur la malnova mar'
al nova cel'.

1986

Alles, was wahr ist

Alles, was wahr ist,
kann leise sein.

Leise reifen die Früchte.
Blätter fallen still.
Stumm deckt der Schnee sie,
sacht friert der See ein
Tod kommt wie Schlaf.

Zeugung ist schweigend.
Sonnenlicht schreit nicht.
Niemand hört es, wenn der Schnee vergeht.
Alle Gräser kommen aus der Erde
stumm.
Wenn sich Blüten öffnen,
dröhnt es nicht.

Alles, was wahr ist,
kann leise sein.

Ĉio vera

Mallaŭta povas esti
ĉio vera.

Mallaŭtaj maturas la fruktoj.
Silenta falas foliaro.
Muta ĝin kovras la neĝo.
Milda frostiĝas la maro –
mort' venas kiel dormo.

Genero sensonas.
Sunlumo ne krias.
Neniu aŭdas la neĝon foriri.
Ĉiu herbo venas el la tero –
muta.
Dum flor' sin malfermas,
ne laŭtas muĝo.

Mallaŭta povas esti
ĉio vera.

Die Liebe muß sein!

Die Liebe muß sein, sagten die Leute.

Die Liebe ist stärker als alles, sagten die Leute,
denn schließlich, sagten die Leute,
war die Liebe immer schon da.
Und also sagten die Leute:
Die Liebe wird immer sein.
Aber die Liebe wird unterdrückt!
sagten die Leute,
die Liebe muß sich verstecken,
die Liebe hat Angst, sagten die Leute.
Das darf man der Liebe nicht antun!
sagten die Leute
und haben die Liebe befreit!

Jetzt gibt es ein Land,
wo die Liebe gesiegt hat,
da macht jetzt die Liebe die Gesetze,
denn die Liebe hat zu bestimmen
über die Leute.
Nun gilt von Montag bis Sonntag
nur noch die Liebe,
und jetzt sagen die Leute, im Namen der Liebe:
Es gibt nur eine einzige, richtige, wahre Liebe,
und die haben wir!
Wer unsre Liebe nicht will, verdient keine Liebe!
Es gibt keine andere Liebe mehr in der Welt.

Die Liebe muß sein, flüstern die Leute.

Amo devas esti!

Amo devas esti, diris la homoj.

La amo pli fortas ol ĉio, diris la homoj,
ĉar fine, diris la homoj,
la amo ĉiam estis.
Kaj tial diris la homoj:
la amo ĉiam estos.
Sed oni subpremas la amon!
diris la homoj,
la amo devas sin kaŝi,
la amo timas, diris la homoj.
Tion oni ne rajtas fari kun la amo!
diris la homoj
kaj liberigis la amon!

Nun ekzistas lando,
kie la amo venkis,
tie nun la amo faras leĝojn,
ĉar la amo decidas
pri la homoj.
Nun regas de lundo ĝis dimanĉo
jam nur amo,
kaj la homoj nun diras, je nomo de l' amo:
ekzistas nur unu ĝusta, vera amo,
kaj tiun ni havas!
Kiu nian amon ne volas, ne meritas amon!
Ne estas plu alia amo en la mondo.

Amo devas esti, flustras la homoj.

Schwierigkeiten der Macht

Der tiefste Haß
des herrschenden Mannes
gilt der Natur.

Daß er
aus der Frau
kommt.
Daß er
in die Erde zurückmuß.
Daß er
Natur sein muß.

Dieser dumpfe,
feuchte, warme
wuchernde
Ungehorsam
in ihm.

Malfaciloj de l' potenco

Ĉe estra vir'
malamo plejas
al la natur'.

Ke li
el in'
venas.
Ke li
en la teron reiros.
Ke li
mem naturas.

Ĉi tiu obtuza,
varmhumida,
diskreska
malobeo
en li.

Größe

Der Welt
größter Hohlraum:
der Mensch.
Nichts
wäre auszudenken,
das nicht
kommen könnte
aus ihm.

Grandeco

La plej granda
kavaĵo de l' mondo:
la homo.
Ne eblas
elpensi ion,
kio ne
povus
veni el li.

Gott und der Mensch

Er hat uns gemacht,
weil er Spaß haben wollte.
Wir nahmen es ernst.

Er hat uns gedroht,
als er ärgerlich wurde.
Wir wurden zu klug.

Er hat uns verflucht,
weil wir nicht mehr gehorchten.
Wir gingen zu weit.

Jetzt aber schwitzt er
vor unseren Plänen
unter den Achseln
vor Angst.

Dio kaj la homo

Li faris nin,
ĉar li volis amuziĝi.
Ni seriozis.

Li minacis nin,
kiam li ekindignis.
Ni tro saĝiĝis.

Li malbenis nin,
ĉar ni ne plu obeis.
Ni tro memstaris.

Sed nun li ŝvitas
pro niaj planoj
sub la akseloj
pro tim'.

Im Namen des

Wenn sie ihn damals
nicht gekreuzigt hätten,
sondern geköpft,
wäre das alles seitdem
im Namen des
heiligen Beiles geschehn?

1986

Nome de

Se oni lin tiam
ne krucumus,
sed senkapigus,
ĉu ĉio ekde tiam
okazintus
nome de l' sankta hakilo?

1986

Zorn

Wenn du einst dachtest,
ich werde hinabsteigen
in das Halbdunkel
der kleinen Lügen,
um mich mit dir
in ihm zu verstecken,
so irrtest du dich.

Ich bin hinabgestiegen,
um deine Flucht zu beenden.

Zürne mir nur.
Das Unwetter der Wahrheit
zu bestehen:
nützt dir der Zorn.

Kolero

Se vi iam pensis,
ke mi subeniros
en la duonmalhelon
de l' mensogetoj
por min kaŝi
kun vi tie,
tiam vi eraris.

Mi iris suben
por meti finon al via fuĝo.

Koleru min.
La tempeston de l' vero
elporti:
utilas vin koler'.

Erfüllung

Wenn der Bestellzettel
der Hoffnungen
ausgefüllt wird,
werden von vielen
die gleichen Worte benutzt.
Werden
Liebe und Gerechtigkeit
an die einzelnen ausgeliefert,
kann man sich
über den Begriff
Erfüllung
schon nicht mehr
einigen.

1984

Plenumiĝo

Plenigante
la mendilon
de l' esperoj
tre multaj homoj
la vortojn uzas samajn.
Tamen
se amo kaj justeco
liveriĝos al la mendintoj,
jam pri la koncepto
plenumiĝo
ne eblos konsento
por ĉiuj.

1984

Unter jeder

Unter jeder
hoffnungsvollen Idee
sammeln sich
Märtyrer und Heilige,
Alleswischer
und Pragmaten,
kleine Gauner und
große Schurken,
Pflichtbesessene und
Pflichtvergessene,
Wahrsager,
Rechthaber,
Vorschreiter,
Mitläufer und
sehr viele Leute –
die einfach da wohnen.

Ĉirkaŭ ĉiu

Ĉirkaŭ ĉiu
esperplena ideo
kolektiĝas
martiroj kaj sanktuloj,
ĉiosciuloj
kaj pragmatistoj,
etaj friponoj
kaj grandaj kanajloj,
obseditoj de l' devo
kaj oscedantoj,
aŭguristoj,
ĉiampravuloj,
pioniroj,
kundrivantoj kaj
multaj aliaj homoj –
kiuj simple tie loĝas.

Vorfall

Da setzt sich einer mittags,
schon sehr besoffen,
mit seiner Flasche im Arm
auf einen Bauaufzug.
Er flucht vor sich hin,
er döst benommen,
er nimmt ab und zu einen Schluck.

Die Putzer kommen vom Essen,
sehn ihn und schicken den Aufzug
zum neunten Stock.
Nun sitzt er da oben,
flucht, fleht und jammert.
Dich, sagen die Putzer,
lassen wir erst wieder runter,
wenn du deine Flasche ausgegossen hast:
Schön langsam
auf deine Hosen.
Natürlich
kannst du auch aufstehn
und runterklettern.
Du kannst sie auch aussaufen
und dich fallen lassen.
Dann putzen sie weiter.

Sehr langsam
steht einer auf,
stellt seine Flasche
vorsichtig
auf die Rüstung
und springt.

Incidento

Sidiĝas ulo tagmeze,
jam ebriega,
kun botelo surbrake
en lift' konstrueja.
Li sakras por si,
dormetas svene,
jen kaj jen enverŝas gorĝplenon.

La purigistoj, revene de manĝo,
ekvidas lin, sendas la lifton
al etaĝo naŭ.
Nun supre li sidas,
pet-veas sakre.
Vin, diras la subaj,
nur tiam ni lasos malsupren,
kiam via botelo
estos elverŝita:
pogute,
surpantalonen.
Vi povas ankaŭ ekstari
kaj grimpi suben.
Sed ankaŭ ĝin finsuĉi
kaj vin lasi fali.
Ili plu purigas.

Malrapide
la ulo ekstaras,
zorge starigas
la botelon
sur la skafaldon
kaj saltas.

1982

An Kleinbürgergräbern

Als sie Kinder waren,
besaßen sie sich und sonst nichts.
Dann verkauften sie sich,
um zu besitzen:
Nahrung und Nachkommen,
ein angenehmes Leben und ein Vaterland.

Sie erstanden das Recht:
Ihre Kraft zu vergeuden für einen Broterwerb.
Ihre Zeit zu vergeuden für einen Schrebergarten.
Ihre Einfalt zu vergeuden für eine Meinung.
Ihr Leben zu vergeuden für ein Ansehn.

Ihr Broterwerb blieb ungenügend.
Ihr Schrebergarten verschandelte die Landschaft.
Ihre Meinung belästigte die Nachkommen.
Ein Ansehen erreichten sie nie.

Als sie starben, starben sie häßlich,
linkisch, unbedeutend und unbefriedigt.
Für ein fröhliches Aus-der-Welt-gehen
besaßen sie nichts.
Alles, was sie besessen hatten, als sie gekommen waren,
hatten sie aufgebraucht bei ihren Bemühungen
um den Besitz.

Ĉe etburgaj tomboj

En la infanaĝo
ili posedis sin, nenion krome.
Poste ili vendis sin
por posedi:
nutraĵon, posteulojn,
agrablan vivon kaj patrujon.

Ili akiris la rajton:
Malŝpari sian forton por panakiro.
Malŝpari sian tempon por ĝardeneto.
Malŝpari sian simplon por opinio.
Malŝpari sian vivon por renomo.

La akirita pano ne sufiĉis.
La ĝardenetoj fuŝis la pejzaĝon.
La opinio ĝenis la posteulojn.
Renomon ili neniam atingis.

Ili devis fine morti naŭze,
mallerte, sensignife, senkontente.
Por forlasi serene la mondon
ili posedis nenion.
Kion ili posedis je la alveno,
ĉio foruziĝis dum la streboj
por la posedo.

Modern Time

Gestern abend
rief der Tod bei mir an.
Es war drei Viertel zehn.
Für Sie liegt,
sagte der Tod mit einer Frauenstimme,
seit vier Minuten
ein Leichnam bereit.
Bitte melden Sie sich
gleich morgen früh
um acht.
Dann legte er auf.

Früher stand an der Tür
ein erschreckter Bote,
der hineingebeten werden mußte,
mit seinem Unheil.
Dann kam das bange Schweigen
der Verlegenheit.
Dann sagte der Bote
die Nachricht auf.
Von Gesicht zu Gesicht.

Wenn der Tod
wieder bei mir anrufen sollte,
werde ich ihm sagen:
Falsch verbunden.

Modern Time

Hieraŭ vespere
alvokis min la morto.
Estis kvarono antaŭ la deka.
De kvar minutoj,
diris la morto virinvoĉe,
kadavro preta
vin atendas.
Bonvolu vin prezenti
morgaŭ matene
je la oka.
Kaj finis la vokon.

Pli frue staris ĉe la pordo
heroldo terurita,
kiun oni devis envenigi
kun ties mismesaĝo.
Poste sekvis la angora silento
de embaraso.
Poste la heroldo
recitis la sciigon.
Vizaĝo kontraŭ vizaĝo.

Se la morto
denove telefonus al mi,
mi dirus al li:
miskontaktigo.

Jetzt

Jetzt
rede ich so mit dem Tod:
bis man das Leben
verlängern kann, beliebig,
lebe ich nicht. Also:
jederzeit kannst du kommen, aber
laß mich nicht fertig sein
mit allem, aber
laß mich nicht leer sein
zuvor.

Immer von ihm wissen,
heißt nicht ihn erwarten.
Immer von ihm wissen,
heißt gründlicher leben.
So rede ich jetzt
vom Tod.

Wenn er kommt,
werde ich anders reden.

Nun

Nun
mi parolas
kun la morto jene:
ĝis oni povos laŭplaĉe
plilongigi la vivon,
mi ne vivos. Do:
vi povas veni iam ajn, sed
lasu, ke mi ne estu
jam post ĉio, sed
mi ankaŭ ne estu malplena
antaŭe.

Ĉiam ĝin konscii
ne estas ĝin atendi.
Ĉiam ĝin konscii
estas pli esence vivi.
Tiel mi parolas nun
pri la morto.

Alie mi parolos,
kiam ĝi venos.

Ein Trost

Wenn einer stirbt, ist gut, sich vorzustellen,
dass er gereist sei in ein fremdes Land,
aus dem er nicht mehr vorhat heimzukommen.
Drum gab er euch beim Abschied nicht die Hand.

Er schreibt auch nicht und sendet keine Grüsse.
Er brach mit allem, was mit euch war, ab.
Er machte sich ganz plötzlich auf die Reise
und hinterliess euch deshalb all sein Hab.

Dort, wo es gut ist, wieder fortzulaufen
ist ihm, bei allem Heimweh, doch zu blöd.
Euch liess er da. Ihr könnt es ihm verübeln.
Es kommt der Tag, an dem ihr ihn versteht.

Konsolo

Se iu mortas, estas bone pensi:
al iu fremda lando li foriris,
kaj jam ne planas li hejmen revenon.
Pro tio adiaŭon li ne diris.

Ne skribas li nek sendas plu salutojn.
Por li ĉio rilata kun vi pasis.
Li devis ekveturi tro subite,
kaj tial ĉian havon li postlasis.

Bonas en tiu land'. Reforkuremo,
malgraŭ la hejmsopiro, lin ne prenos.
Li lasis vin. Vi eble lin kulpigas.
Venos la tago, kiam vi komprenos.

Enhavo de la libro

Antaŭvortoj.....	2
Mallonga biografio pri Heinz Kahlau	3
Das Paar.....	4
La paro.....	5
Ich liebe dich	6
Mi amas vin	7
An einem Tag	10
Iun tagon.....	11
Erfahrung.....	12
Sperto.....	13
Bitterer Vorschlag.....	14
Amara propono	15
Das Gesetz der Liebe	16
La leĝo de amo.....	17
Du gehst.....	18
Vi foriras.....	19
Plano por adiaŭo	20
Adiaŭo	21
Bei einem Abschied.....	22
Adiaŭe.....	23
Wir haben gesungen	24
Kaj ni kantis.....	25
Entfernungen	26
Distancoj.....	27
Gastarbeiter.....	28
Gastlaboristo	29
Der Gast.....	30
La gasto.....	31
Reisen bildet	32
Vojaĝo edukas	33
Sein oder Haben.....	34
Esti aŭ havi	35
Der Rat.....	36
La konsilo	37
Begegnung mit einem Europäer	38
Renkontiĝo kun eŭropano.....	39
Balado.....	40
La plej bela	41

Bitte um Nachsicht	42
Peto pri indulgo.....	43
Wann Männer am gefährlichsten sind	44
Kiam viroj estas plej danĝeraj	45
Monster	46
Monstro.....	47
Der Tod des Dichters	48
La morto de l' poeto	49
Irrtum eines Dichters	50
Eraro de poeto.....	51
Literaturbetrieb	52
Literatura industrio	53
Leben	54
Vivi	55
Narren und Seher	56
Frenezuloj kaj viziuloj	57
Und allein	58
Kaj ni solas	59
Morgenfurcht	60
Matena timo.....	61
Das Lied von der Eile	62
La kanto pri la hasto	63
Stapellauf.....	64
Lanço de ŝipo.....	65
Alles, was wahr ist.....	66
Ĉio vera.....	67
Die Liebe muß sein!.....	68
Amo devas esti!	69
Schwierigkeiten der Macht	70
Malfaciloj de l' potenco.....	71
Größe	72
Grandeco.....	73
Gott und der Mensch	74
Dio kaj la homo	75
Im Namen des	76
Nome de.....	77
Zorn	78
Kolero.....	79
Erfüllung.....	80
Plenumiĝo.....	81
Unter jeder	82
Ĉirkaŭ ĉiu	83

Vorfall.....	84
Incidento	85
An Kleinbürgergräbern.....	86
Ĉe etburgaj tomboj	87
Modern Time	88
Modern Time	89
Jetzt.....	90
Nun	91
Ein Trost	92
Konsolo.....	93
Enhavo de la libro.....	94

“Hans Dubois”: interlinguistica

Scaricabili da / Elŝuteblaj el: www.taziocarlevaro.ch

- Carlevaro- Tazio (Red.): *Francesco Soave, György Kalmár e la lingua universale. Un capitolo poco noto della storia dell'interlinguistica*. Bellinzona 2020: Dubois. PDF. 978-88-87282-43-6
- Carlevaro Tazio: *Ĉu Esperanto postvivos la jaron 2045?* Bellinzona, 1-a Ed. 1999; 2. Ed.: 2000; 3-a Ed. 2019, Dubois, PDF; 88-87282-03-X
- Carlevaro, Tazio (curatore): *Domaine de la recherche en linguistique appliquée. Contributions*, 1-a Ed. 1998; 2. Ed. 2017, Hans Dubois, PDF, 88-87282-09-9
- Carlevaro, Tazio (Red, Trad.): *Esperantal Antologio en Idolinguo*. Bellinzona, Ed. Dubois. 1 (1977), 2 (2019); PDF, 978-88-87282-48-1
- Carlevaro, Tazio (Red.): *Premier colloque d'interlinguistique. CDELI 1994. Contributions*. Bellinzona, Ed. Dubois PDF. 1 (1994), 2 (2017); PDF, 978-88-87282-50-4
- Carlevaro, Tazio: *Die naturalistische Schule in der Interlinguistik*. Sonderdruck au *Plansprachen*, S. 330-348, 1976, und *Linguistische Berichte*, 1972. Bellinzona 2019: Dubois, PDF; 978-88-87282-62-7
- Carlevaro, Tazio: *Eseo pri Ido. Origino, Lingvo, Historio, Kulturo 1908-2020*. Tria eldono plene reviziita kaj kompletigita. Bellinzona, Ed. Dubois, 3-a eld. 2020 (1-a eld. 1993; 2-a eld. 1976), PDF, ISBN 978-88-87282-46-7
- Carlevaro, Tazio: *Esperanto kaj Interlingua. Faktoj, teorioj, praktiko, opinioj, historio, 1950-1977*. Bellinzona, Ed. Dubois. 1 (1976), 2 (2019); PDF, 978-88-87282-60-3
- Carlevaro, Tazio: *G.W. Leibniz, kaj la teorio de Ido*. El: “*Einführung in die Interlinguistik*”, Red. Carlevaro, kaj Günther Lobin, 1979. Bellinzona 2019, 2. Ed. Dubois. PDF. 978-88-87282-58-0
- Carlevaro, Tazio: *Literaturo kaj kulturo de Esperanto 1887-1972. Tri ĉapitroj pri Esperantaj beletro kaj kulturo*. El la unua eldono 1974 (“*Esperanto en Perspektivo*”). Bellinzona 2019: Dubois. PDF; 978-88-87282-56-6
- Carlevaro, Tazio: *Per construire una lingua. L'interlinguistica tra autonomia e neolatinismo*. Bellinzona. PDF, 1 (1993), 2 (1995), 2 (1997), 4 (2019); 88-86282-06-4
- Carlevaro, Tazio; Hauptenthal, Reinhard; Neves, Gonçalo; Madonna, Tiberio: *Bibliografio di Ido*. Bellinzona 2020, Ed. Dubois. 1 (1999), 2 (2015), 3 (2020); PDF. 978-88-87282-41-2 (Edizioni precedenti: ISBN 88-87282-04-8; autori, solo Carlevaro e Hauptenthal)
- Ferrari, Jean-Pierre: *L'espéranto au service de l'enseignement du français. Quelques possibilités*. 1996. Avec une introduction de Tazio Carlevaro; Dubois: 1 (1992), 2 (1996), 3 (2020); PDF, 978-88-87282-42-9.
- Goldoni, Carlo: *Le albergatrice*. Traducite in interlingua per Tazio Carlevaro, Bellinzona, Dubois, PDF. Edizioni: 1 (1995), 2 (1999), 3 (2019); 88-87282-02-1
- Goldoni, Carlo: *Le familia del antiquario*. Trad. Tazio Carlevaro. Ed. Dubois: 1 (1980), 2 (1993) 3 (2019); PDF, 978-88-87282-54-2
- Herder, Johann Gottfried; Soave, Francesco: *Gli esseri umani, abbandonati nello stato di natura, sono in grado di elaborare spontaneamente una lingua? E in qual maniera potrebbero pervenirvi? Saggi per un concorso su d'un esperimento mentale*. Red. Tazio Carlevaro. Bellinzona 2020: Dubois. PDF; 978-88-87282-45-0
- Juste, Andreas: *Idala foliumi*. Red. Tazio Carlevaro. Bellinzona 2019, 1-a Ed. 1998, 2. Ed. 2029, Dubois, PDF; 88-87282-00-5
- Juste, Andreas; Pascau, Louis: *Epistolaro da Ido-Poeti*. Red. Tazio Carlevaro, Dubois 2019. PDF. 978-88-87282-52-8
- Kahlau, Heinz: *Kaj ni solas. Dulingva poemaro, kun biografio de HK (Carlevaro)*. Trad. István Ertl, Dubois: 1-a Ed. 1991; 2-a Ed. 2020, PDF, 978-88-87282-44-3
- Pascau, Louis; Carlevaro, Tazio: *Modern Ido-Poeti*. Bellinzona 2019, Dubois, PDF. 1 (1981), 2 (2019); 978-88-87282-40-5
- Soave, Francesco: *Come costruire una lingua universale. Kiel konstrui universalan lingvon*. Red. Tazio Carlevaro. Bellinzona 2020: Dubois: PDF. 978-88-87282-47-4